

Provenca
Esperanto-Federacio
kvaronjara gazeto
140
printempo 2025

espéranto
Provence

Leĝa depono ĉe BNF
ISSN 2609-5203

Federacia retejo
www.esperanto-provence.org

Prezidanto
Rosy Inaudi
06 18 35 18 40
r.inaudi@free.fr

Aliĝkotiĝo (kun la gazeto) : 6€
> ĉeko al : Espéranto-Provence
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Marc Gallardo
Les Hespérides II Bât. B2
67 bd des Alpes- 13012 Marseille
gallardomarc@ymail.com
06 09 89 09 14
> aŭ bankĝiro
(bankinformoj sendotaj laŭpete)

Redaktoro
Pascal Panarotto
06 26 34 30 93
ilarione13@outlook.fr

Grafikistino
Mh Bertucceli
mhbertucceli@gmail.com

**Limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°**
15-a de junio 2025
bonvolu sendi al la supra retadreso

★★★

antaŭdankojn pro viaj kontribuaĵoj

Vorto de la redaktoro

En la gazeto numero 139 Pascal VILAIN anoncis ke li ne povos plu zorgi pri TIO. Ĉiuj, en la kurso de Renée TRIOLLE la mardon vesperon ni diris NE !! la gazeto ne devas halti (foto poste).

Ni kaj vi certe dankas Pascal por la laboro de tiuj jaroj kaj ni deziras al li bonajn daŭrigojn en Dunkerko.

Do, ni estas komencintaj la redaktadon de la numero 140.

Ni esperas ke ĝi plaĉos al vi kaj ĉefe ni esperas ke vi sendos artikolojn, fotojn, impresojn, vojaĝojn pri esperanto.

Via partopreno estos tre grava kaj interesa ĉiam en la spirito de Zamenhof kiu vivas en ni.

Ni volas fari el la gazeto ligilon tra ni kaj ilon de la kulturo esperantista.

Ek al laboro !!!!



Fokuso

Evidente, ni parolos en la gazetoj pri la vivo de la « KOLEGARO » esperantista kunvenoj, renkontaĵoj, kursoj, fakte, la kutima agado. Sed ankaŭ ĉio kio plaĉas al la redaktoroj la KULTURO : muziko, vortoj, mangaĵoj, KTP.

Kaj, ni esperas ke vi venos rapide en la klubo de la redaktoro.

(vous trouverez des idées d'articles à la page suivante)

Baldaŭ skribu kaj sendu viajn artikolojn al Pascal PANAROTTO
mel : ilarione13@outlook.fr

Saluton

Enhavo

- | | |
|-------|--|
| 3 | Temoj por artikoloj / Dato de ekzamenoj |
| 4 | La tridek vortoj plej uzataj de la franca lingvo |
| 5 | Esperantistoj festante la reĝkukon |
| 6-7 | Falsaj amikoj |
| 8-9 | Ekskurso : Vizito al St Raphael |
| 10 | Vidpunkto |
| 11 | Artefarita intelekto |
| 12-13 | Muzikkulturo |
| 14 | Recenzo pri la libro « Higieno de l'murdisto » / Nekrologo |
| 15 | Recepto : ovoblankaj kuketoj |
| 16 | Agendo |

Liste des thèmes que les rédacteurs peuvent choisir

- ★ La vie de Zamenhof
- ★ Les signes (hymne, drapeau)
- ★ Une activité particulière (nudisme, la paix...)
- ★ Le passeport
- ★ L'organisation mondiale
- ★ 1 homme célèbre qui a parlé de l'esperanto
- ★ 1 lieu (Gresillon)
- ★ L'actualité (élections européennes 2024...)
- ★ 1 film
- ★ 1 réflexion sur les langues (IA...)
- ★ Facile à apprendre mais particularités grammaticales
- ★ Comment apprendre (expériences personnelles)
- ★ Anecdotes
- ★ Proverbes
- ★ Pourquoi et comment on est venu à l'espéranto (interview?)
- ★ Quand finit-on d'être « krokodilo » ?
- ★ BD
- ★ Jeux
- ★ Lettre à Zamenhof
- ★ ...

VOS SUGGESTIONS ?

Sesio de la ekzamenoj de FEI, la 22an de junio 2025 en Marseille

Regiona sesio de la ekzamenoj de FEi (unua kaj duagrada) okazos en Marseille, dimanĉon la 22an de Marseille, ĉe CIRA, 50 rue Consolat (metro : Réformés-Canebière ; 15 minutojn piede de la stacidomo Saint-Charles) .

Matene je la 8.30 : akcepto kaj kafo
de la 9a ĝis la 12a : skriba parto
12a : pikniko surloke

Posttagmeze : parola parto

Pli da detaloj ĉe la reto Institut Français d'Espéranto.

Nepre anticipu anoncu vin al triolle.renee@wanadoo.fr

La tridek vortoj plej uzataj de la franca lingvo

Laù la Almanack Vermot

(dek verboj, dek adjektivoj, dek nomoj
kaj la tradukado en esperanto)

1) dek verboj	2) dek adjektivoj	3) dek nomoj
être esti	tout/toute ĉio	humain homo
avoir havi	grand granda	mari edzo
faire fari	petit malgranda	femme virino
dire diri	même sama	jour tago
aller iri	autre alia	mer maro
voir vidi	seul sola	temps vetero
pouvoir povi	jeune juna	main mano
vouloir voli	premier unua	chose afero
venir veni	bon bona	vie vivo
prendre preni	quel kiu	yeux okuloj

SED... mi pensas ke la dek nomoj plej famaj, en Esperanto, estas :

ZAMENHOF	AMIKECO
AMO	SAMIDEANO
PACO	INTERNACIA
FRATECO	KUNVENO
VERDA STELO	MONDO



Marsejlaj esperantistoj festante la reĝkukon la 6-an de januaro.

Jen tradicia momento, kiu kunigas la kursanojn kaj «malnovajn» esperantistojn.

Pli tradicie, la plej juna, Sylvain, kaŭriĝis kaj de sub la tablo distribuis la kukpecojn. Reĝoj iĝis Pascal (maldekstre) kaj Christophe (dekstre).

Ni lernis kaj kunkantis «Vivu la stel'» kaj diskutis pri pli gravaj temoj, ekz.

Ĉu artefarita intelekto aŭ maŝinoj komplete anstataŭos la homon ?

Kiel mezinteligentaj aŭ mezedukitaj homoj trovos simplajn laborojn ?

Ĉu socio povos elteni 50% da senlaboruloj ?



Membro-kunveno en La Ciotat

Kiel kutime, okazis la Membro-kunveno de Espéranto-La Ciotat antaŭ la Reĝa Kuko.

Estis nur raportoj kaj demando : ne plu restas mono el profito de spektaklo de Jean-Jacques antaŭ dek jaroj ! Ni rezignis pri kotizo, kaj preferas, ke la homoj kontribuu al la elspezoj (fotokopioj aŭ trinkaĵoj kaj manĝaĵetoj okaze de akcepto).

Interese, ĉeestis la plej malnova kaj plej aĝa esperantisto de La Ciotat (Michel Eliard) kaj la lasta alveninta kaj plej juna, Théo Farenc.

Falsaj amikoj

Jen listo de falsaj amikoj en la franca
(verkis Frédéric Gilles)

Ne konfuzi kun

Esperanto vorto	Franca traduko	Esperanto vorto	Franca traduko
rapo	<i>navet</i>	repo	<i>rap</i>
kapro	<i>chèvre</i>	kaporo	<i>câpre</i>
salo	<i>sel</i>	aĉulo	<i>salaud</i>
koko	<i>coq</i>	kokoso	<i>coco</i>
hordeo	<i>orge</i>	hordo	<i>horde</i>
droni	<i>se noyer</i>	droneo, spavo	<i>drone</i>
slipo	<i>fiche</i>	kalsono	<i>slip, caleçon</i>
roto	<i>détachement militaire</i>	rukto	<i>rot</i>
ebena	<i>plat, lisse</i>	ebona	<i>ébène</i>
velo	<i>voile (bateau)</i>	biciklo	<i>vélo</i>
gravi	<i>être important</i>	gravuri	<i>graver</i>
uzi	<i>utiliser</i>	eluzi	<i>user</i>
kranio	<i>robinet</i>	kranio	<i>crâne</i>
deveni	<i>a pour origine</i>	iĝi	<i>devenir</i>
		diveni	<i>deviner</i>
cervo	<i>cerf</i>	cerbo	<i>cerveau</i>
peĉo	<i>poix</i>	persiko	<i>pêche</i>
persiko	<i>pêche</i>	petroselo	<i>persil</i>
klara	<i>instruit, cultivé</i>	klara	<i>clair (compréhensible)</i>
		hela	<i>clair (lumineux)</i>

Ne konfuzi kun

Esperanto vorto	Franca traduko	Esperanto vorto	Franca traduko
pastelo	<i>pastille</i>	paŝtelo	<i>pastel</i>
pasteĉo	<i>pâté</i>	akvomelono	<i>pastèque</i>
pliigi	<i>augmenter</i>	faldi	<i>plier</i>
spino	<i>colonne vertébrale</i>	dorno	<i>épine, piquant</i>
senti	<i>ressentir</i>	odori	<i>sentir (avoir une odeur)</i>
subskribi	<i>signer</i>	flari	<i>sentir (flairer)</i>
trafi	<i>atteindre</i>	kontrakti	<i>souscrire (un contrat)</i>
lilio	<i>lys</i>	ŝakri	<i>trafiquer</i>
presi	<i>imprimer</i>	siringo	<i>lilas</i>
premio	<i>prix</i>	premi	<i>presser</i>
desegni	<i>dessiner</i>	unua	<i>premier</i>
sitelo	<i>seau</i>	almontri	<i>désigner</i>
tapeto	<i>tapisserie, tenture</i>	loko	<i>site, lieu</i>
aŭskulti	<i>écouter</i>	kaptilo	<i>tapette, piège</i>
pato	<i>poêle à frire</i>	aŭskultumi	<i>ausculter</i>
kupeo	<i>compartiment</i>	pasto	<i>pâte</i>
reno	<i>rein</i>	kruro	<i>patte, jambe</i>
		kaliko	<i>coupe, calice</i>
		norda cervo	<i>renne</i>

Vizito al St Raphael



En dimanĉo la 16-a de Marto 2025, grupo da Esperantistoj partoprenantaj en MES (Mediterranea Esperanto-Semajno) vizitis kune la ĉarman provencan urbeton St Raphael por ĉeesti la tiean karnavalan paradon. Dudeko da MES-anoj buse ekvojaĝis en la frua posttagmezo kaj alvenis tien post komforta duon-hora veturado. Bonvenigis ilin bela suno sed ankaŭ nekutime malvarma mediteranea vento.

Tiu 'freŝa aero' tamen tute ne malplibonigis la ĝojan sperton pri spektado de la dancistoj, kantistoj, aktoroj kaj klaŭnoj formantaj la paradon. La artistoj ĉiam rideteme kaj entuziasme montris sian lerton kaj kapablojn kaj transdonis sian entuziasmon al la





ĝoje kunkantantaj kaj fotantaj esperantistoj. Post la parad-spektado, la grupo esploris la vizitindan urbon, ĝiajn marbordan promenejon, parkon, ĉefan preĝejon, luksan havenon kaj malnovan urbocentron. Notindaj estis la tieaj ĉarmaj stratetoj, mezepoka templana preĝejo, kaj la multaj ornamaj olivarboj disigitaj ĉie tra la stratoj kaj ŝtonpavimaj placetoj.



Post sufiĉe longa piedirado, la iom frostiĝintaj sed feliĉaj esperantistoj ĝuis varman ĉokoladon aŭ kafon urbocentre antaŭ ol reveni al la MESejo por la vesperaj programeroj. Ĉeestis la ekskurso esperantistoj el Francujo, Svislando, Italujo, Ukrainujo, Britujo, Katalunujo, Belgujo, Rusujo kaj Germanujo. Kiel kutime, notindas krom la bela vizito, ankaŭ la okazo interkonatiĝi, malkovri aspektojn de la vivo de aliaj esperantistoj kaj pasigi bonan tempon kune. Bonan (malfruan) karnavalon al ĉiuj.

Maurizio 'Rico' Giacometto.



Mon expérience de Komencanto

Bonjour je suis Ludovic j'ai commencé à apprendre l'espéranto en février 2025. J'avais entendu parler de la langue et de la culture Espéranto pour la première fois en 2018 depuis je me suis mis en tête d'en apprendre plus sur cette langue, sa culture et son histoire. Maintenant j'apprends l'espéranto je peux vous dire que oui c'est une langue facile à apprendre si vous êtes français ou latin. J'apprends l'espéranto en parallèle sur duolingo et je côtoie des Esperantistes chaque semaine pour habituer mon oreille à la langue. De mon point de vue de débutant les deux difficultés que j'ai relevées sont : l'autodiscipline et le manque de vocabulaire. Restons optimiste je me vois progresser et ça me fait aller dans le bon sens et la passion.

L'intelligence Artificielle chinoise et domaine public «deepseek» aime l'espéranto

Oui je sais les vieux espérantistes que nous sommes sont majoritairement peu mobilisés sur l'actualité de l'intelligence artificielle. Et pourtant c'est sûrement un domaine où nous devrions être aussi mobilisés que lors de la fondation de Wikipédia et de l'internet en général.

Aujourd'hui dans le domaine particulier de la programmation, pour moi en Python, je confirme le fait extraordinaire suivant : Deepseek comprend très bien et très vite l'espéranto bien mieux que le français.

Il écrit d'emblée les programmes dont je lui définis les objectifs en utilisant des noms de fonction, de

classe, de variable etc dans un espéranto parfait. Il invente des intitulés très bien conçus où il utilise le pluriel et même l'accusatif et sans faute !

Il n'a pas ces qualités avec le français où ses réponses sont souvent incompréhensibles, il serait utile que des espérantistes d'autres langues explorent ce qu'il en ait pour l'allemand, l'anglais, etc car il y a là un argument de «vente» pour le «produit» «espéranto»

de première grandeur, car l'incidence d'une productivité accrue en programme informatique ne laissera personne indifférent.

Merci de votre attention

Denis-Serge Clopeau





© Laura Contournet

Klavharpo

(verkis Christophe Collay)

Kiel vi eble vidis en la numero 137 de la gazeto Esperanto-Provence, en somero 2024, kiam mi ludis tian muzikilon dum la lasta Esperanto-kurso en Marsejlo pasintjare. Hodiaŭ mi rakontas al vi pli pri ĉi tiu muzikilo.

Klavharpo, nomita “nyckelharpa” en la sveda lingvo, estas sveda tradicia muzikilo ludata per arĉo per la dekstra mano kaj per klavaro per la maldekstra mano.

Ĝia origino datiĝas almenaŭ je mezepoko. Ĝi estas bildigita sur la bareliefoj datumantaj je la 1350-aj jaroj, de la preĝejo Källunge en la insulo Gotland meze de la balta maro (vd la foton transdonitan de Christophe).

Ĝi havas kvar melodiajn kordojn, ludatajn, kaj dekdu simpatiajn kordojn kiuj reprezentas la dekdu duontononj el la kromata gamo, kaj kiuj sonas per harmonio sen esti tuŝataj nek de arĉo nek de klavoj.

La klavharpo enkondukiĝis en Francio de Laurent Vercambre, el la grupo Malicorne en la sepdekaj jaroj. La sveda internacia grupo Väsen uzas klavharpon ekde 1989 tra la mondo.

Mi lernis ekde 2011 kun Eleonore Billy, franca frontfiguro pri klavharpo, kiu pasigis du jarojn en Svedio. Mia muzikilo faritis de Jean-Claude Condi, la unua franca fabrikanto de klavharpoj, en Mirecourt (Vogezoj).



© Bernt Enderborg



Le chanteur


Jonny M

(verkis Ludovic)

Ami du pacifisme et de la bonne musique bonjour. Jonny M est un chanteur allemand de Reggae, qui chante son art en espéranto. Il a 2 albums à son actif et un en préparation. Sa chanson la plus emblématique est «Dankon». Alors hâtez vous sans vergogne pour découvrir cet espérantiste chevronné.



Recenzo pri la libro « Higieno de l' murdisto »



« Higieno de l' murdisto » estas vere rekomendinda verko de la fama belga verkistino Amélie Nothomb. Dank'al Armela Le Quint kaj Ĵak Le Puil eblas legi ĝin en Esperanto. La eldonejo estas KLEKS.

La rakonto temas pri Pretekstat Taŝ, maljuna aŭtoro mondkonata, kiu ne vivos pli ol du monatojn. Pluraj ĵurnalistoj provas intervjui lin por malkovri lian sekreton. Sed la mizantropo ne faciligas ilian taskon.

SinJORINO Amélie Nothomb kreis fortan personecon, kiu uzas spitajn rimarkojn, malestimon, humiligojn, malamon, humuron, ktp. Ŝi per dialogoj kaj vigla stilo elvokas ĉe la leganto koleron, kompaton, naŭzon, streĉon, deziron rebati, surprizon, ktp.

Mi volonte legos la tutan serion d'Amélie.

Kara legonto, se ankaŭ vi volas malkovri la sekreton de tiu Pretekstat Taŝ, la ĉefrolulo, estu forta !

Maggy Combot

Nekrologo

Hazarde legante «La Provence» de la 8-a de januaro, mi eksciis pri la forpaso de Pastro Pierre Bonesso (86-jara), kiu lernis kun mi en CIRA sub la standardo «Ni Dieu ni maître»!

Li paŝis malfacile post trafikakcidento, en kiu pistiĝis liaj kruroj. Li esperis emeritiĝi kiam li iĝis 70-jara, sed pro manko de pastroj, li devis deĵori en alia parokejo, en Montredon, do kun tre dissemitaj parokanoj.

Li diservis okaze de la kongreso en Martigues.

Ovoblankaj Kuketoj

Rosy Inaudi

Ne malŝparu viajn ovoblankojn, faru kuketojn !

Ni ofte forĵetas ovoblankojn kiam ni ne bezonas ilin por recepto. Mi neniam forĵetas ilin, mi metas ilin en la frostujon kaj poste, kiam mi havas almenaŭ 4 ovoblankojn, mi faras bonegajn kuketojn.

Ingrediencoj :

- Migdala pulvoro 300 Aveloj
- Ovoblankoj 4
- Glazura sukero 40 g
- Migdaloj 100 g
- Amara migdala guto



Preparado :

- Paŝo 1 - Antaŭvarmigu la fornon je 180 °C (gasa marko 6).
Superŝutu pladon per kuirpapero.
- Paŝo 2 - Miksu la migdalan pulvoron kun la sukero.
Aldonu la ovoblankojn.
Miksu ĉion kune ĝis vi ricevas glatan miksaĵon.
- Paŝo 3 - Se vi uzas, aldonu la amarajn migdalajn gutojn.
- Paŝo 4 - Prenu egalajn bulojn da pasto kaj metu ilin sur la platon, interspacigante ilin. Platigu ilin iomete per fingroj.
- Paŝo 5 - Metu migdalon sur ĉiun kuketon (ĉi tio estas laŭvola), tiam aspergu la kuketojn per glazura sukero.
- Paŝo 6 - Metu en la fornon kaj kuiru dum 10 ĝis 12 minutoj, depende de la potenco de la forno. La kuketoj devas esti iomete brunitaj.

À noter sur votre agenda



Dans notre fédération

Plusieurs cafés linguistiques "esperanto" :

1^{er} jeudi de chaque mois - 18h - Marseille (13)

La Passerelle - 26 rue des Trois Mages (près du Cours Julien) - 6^{ème}

infos : *Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51*

Dernier jeudi de chaque mois - 17h - Lorgues (83)

"Carnets de voyage" - 12 avenue Allongue (rue face à la mairie)

infos : *Jean-François Cousineau - 06 82 53 52 02*

En France

pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs

Baugé (49) - Château de Grésillon

<http://gresillon.org/?lang=fr>

Bouresse (86) - Kvinpetalo

<http://www.kvinpetalo.org>

Mai 23-27 - Vigy (57) : 77^e Congrès de Sat-Amikaro

<https://sat-amikaro.org>

Juin 7-9 - Nantes (44) : Congrès d'Espéranto-France

<https://esperanto-france.org/congres-2025>

Août 9-16 - Baugé - Château de Grésillon : 98^e Congrès de SAT

<https://eventaservo.org/e/ad39fc>

Ailleurs en Europe et dans le monde

Juillet 19-26 - Belgrade (Serbie) :

58^e Congrès International de l'éducation - Eo ILEI

<https://2025.kongreso.org>

Juillet 26-août 2 - Brno (Tchéquie) :

110^e Congrès mondial d'espéranto

<https://uk.esperanto.net/2025/>

Août 9-16 - Cisarua (Indonésie) :

81^e Congrès international des jeunes espérantophones (IJK)

<https://ijk2025.tejo.org/novajoj/>